



# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 30<sup>a</sup> jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k103/k103.html>



**Pri Venezuelo**

**Prometeo kaj Elpis**

**Sub la flago**

N<sup>o</sup> 103<sup>a</sup>

Aprilon 2019

**Kajeroj****el la Sudo**

*Bulteno de la Hispana Asocio de  
Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

**Calle Jabonerías, 6.3° D  
30010 Murcia**

**Hispanio** ISSN 1886-1938 (printita)

**Enhavo**

Redaktore: Sub la flago.....	3
Pri Venezuelo.....	4
Grammata fermis.....	10
Prometeo kaj Elpis.....	11
Antonio Jiménez Manjón.....	14
La dua edzino.....	15
La Faraono, ĉ. 52.....	17

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: [kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

Oni povas reprodukti la enhavon,  
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas  
ties aŭtoroj, ne la redakcio.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,  
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun  
artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies  
enhavo mistraktas nenium personon.

**Kovrilo:** Amasa manifestacio en Madrido je la 10<sup>a</sup> de februaro 2019  
pruvis, ke la popolo ne kongruas kun misfaroj de registaro.

**Pagmaniero:** aliĝu al HALE kontraŭ €10  
jare por ricevi la surpaperan version de  
nia magazino.

**Konto** **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al  
[kajeroj@gmail.com](mailto:kajeroj@gmail.com)

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de  
donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi  
kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:  
OpenOffice Writer, Gimp, Scribus, gFtp kaj Bluefish.

Nesubskribitajn  
artikolojn verkis  
la redaktoro.



Redaktore

**Sub la flago**

**D**imanĉon, la 10<sup>an</sup> de februaro mi atestis grandan manifestacion en Madrido por la unuiĝo de Hispanio. Mi neniam vidis tiom multe da flagoj de nia lando. Estis kvazaŭ tajdo ruĝflava. La Registaro intencis nuligi la gravecon de tiu manifestacio, malkreskigante la nombron da manifestaciantoj, sed nur el Mursjo iris 22 aŭtobusoj,

Laste ni havis prezidenton, kiu emis resti en sia posteno ne nur por organizi balotadon, kiel li promesis, sed kiel vera prezidento ĝis la fino de la prezidenta periodo. Cele al tio, li bezonas apogon de aliaj partioj, sed nur naciismaj partioj apogis lin..., ĝis kiam ili vidis, ke tiu ĉi prezidento ne akceptas iliajn postulojn. Sekve tiu ĉi politika periodo hispana estis senfruktodona kaj stranga. Nun magio naciisma elĉerpiĝis, kaj la venontan 28<sup>an</sup> de aprilo okazos balotadon en Hispanio, denove por elekti parlamenton, kiu nomumos registaron, okazigante tiumaniere festumadon maldemokratian pro tio, ke povo leĝofaranta kreas povon leĝoekzekutantan.

Hispanio havas malsanon devenantan el okdekokjaraĝa Intercivitana Milito, kies venkita partio neniam prenis la flagon de Hispanio kiel sian, kaj trudante la ideon, ke hisi ĝin estas iĝi faŝisma, eble pro tio, ke PSOE kaj PCE tiam hisis la flagon de Sovetunio, kies satelita lando ili penis, ke Hispanio estu. Tamen la 10<sup>an</sup> de februaro miloj da hispanoj pruvis, ke Hispanio estas multe pli ol maldekstro aŭ dekstro. Fakte progreson oni povas konstrui en Hispanio nur se oni konscias pri tio, ke Hispanio estas ni ĉiuj.

Fi al faŝismo, fi al komunismo, fi al separatismo, kiuj neniam sukcesis aŭ sukcesos detrui nin. Ni konstruu demokration por Hispanio.



## **Pri Venezuelo** de Isaac Santiago

**M**ia nomo estas Isaac kaj mi estas venezuelano. Mi estas devigita paroli pri la aktuala situacio de mia lando, ne nur pro tio ke mi estas esperantisto de Venezuelo, sed ankaŭ pro tio ke mi vivis proksime la politikan kaj ekonomikan krizojn kaj ankaŭ pro tio ke mi havas studojn pri ekonomiko.

Kio okazas en Venezuelo? Kial kaj kiel okazis? Tion mi esperas bone klarigi.

### **Pri la ekonomika krizo**

Venezuelo havis petrolan riĉecon dum kelkaj jaroj (2007-2014), en tiu epoko la registaro uzis tiun riĉecon (900.000 milionoj da usonaj dolaroj) por kreskigi la ŝtatan elspezon, sed ankaŭ komencis kontroli kaj ŝtatigi la ĉefajn industriojn, tiamaniere kreskigis ankaŭ la koruptadon.



Nova gvidanto  
por nova tempo

La propra registaro anoncis ke 20.000 milionoj da usonaj dolaroj perdiĝis; sed post la morto de Hugo Chávez (2013) lia ĉefekonomisto, Jorge Giordani malproksimiĝis de la registaro pro la granda koruptado kaj li anoncis ke la registaro ŝtelis pli ol 300.000 milionojn da usonaj dolaroj, trionon de tiu petrola riĉeco. Dum tiuj jaroj la registaro ne povis efike funkciigi la ŝtatajn industriojn kaj en la lastaj jaroj de la petrola riĉeco, la registaro devis importi preskaŭ ĉion de fremdaj landoj, initer ili: la medikamentojn kaj nutraĵojn, kiujn la lando produktis antaŭe, sed pro granda kontrolo, burokratismo kaj koruptado la lando jam ne povis memprodukti.

Sed poste finiĝis la petrola riĉeco. La petrolo kiu iam kostis pli ol 100 usonajn dolarojn, en 2014 apenaŭ kostis 40 usonajn dolarojn. La kialo de la malkreskiĝo estis diversaj:

- Uzo de novaj metodoj por ekspluati la petrolon (fracking).

- Malrapidiĝo de la ĉina ekonomika kreskado.
- Finiĝo de la ekonomika blokado al Irano.
- Vendado de petrolo malmultekoste de Sauda Arabio por konkuri kun Irano kaj Fracking.

Pro la finiĝo de la petrola riĉeco, Venezuelo jam nek povis importi nutraĵojn nek medikamentojn, komenciĝis granda manko de ĉio en la lando, personoj devis fari vicon dum horoj kaj poste dum tagoj por povi aĉeti apenaŭ kilogramon da rizo aŭ faruno, unu fojon semajne.



La superbazaroj en Venezuelo estas preskaŭ malplenaj.

La registaro kiu ŝtatigis la ĉefajn industriojn, havis pli ol 3 milionojn da ŝtataj funkciuloj. La registaro kiu jam ne havis monon, kreis monon sen garantio por pagi al la funkciuloj kaj por pagi al maljunuloj sian emeritiĝon. Tiu mono sen garantio estis la kaŭzo de la granda inflacio (170% en 2014; 380% en 2015; 300% en 2016; 3.500% en 2017; kaj pli ol 1.000.000% en 2018).

Mi mem perdis pli ol 8 kilogramojn da pezo en 2016, mi mem havis salajron de malpli ol 20 usonaj dolaroj en 2016 monate, sufiĉe nur por manĝi (sed ĉiufoje mapli) . Mi mem devis fari vicon dum horoj por aĉeti apenaŭ 1 kilogramon de rizo aŭ faruno, kelkfoje mi devis fari vicon dum kelkaj horoj kaj, antaŭ povi aĉeti, ĉio finiĝis.

Tre malfacile estis havi tiun vivon dum kelkaj jaroj, kaj ĉiu jaro estis pli malbona. Tre malfacile estis ne povi helpi miajn gepatrojn



Multaj personoj  
manĝas  
postrestaĵojn el  
manĝo pro  
bezono.

ekonomike, kaj estis malfacile vidi ke ili ne povu aĉeti la medikamentojn kiujn ili bezonas. Pro tio mi devis eliri la landon en 2017.

### **Pri la venezuela amas-elmigrado**

Ekde antaŭ multaj jaroj centoj da miloj de venezuelanoj eliris la landon pro la ekonomika krizo, sed ekde 2016, estas milionoj da personoj kiu eliris la landon. Oni kalkulas pli ol 3 milionoj. La plimulto iris al Kolombio kaj Peruo, centoj da venezuelanoj eĉ piediris milojn da kilometroj por eliri la landon. Ne estas facile aĉeti aviadilbileton kiam via salajro apenaŭ permesas vin manĝi aŭ malpli.



Oni bezonas  
centojn da  
monbiletoj  
por aĉeti nur  
ovojn.

Multaj estas kuracistoj, inĝenieroj, ekonomikistoj, advokatoj, sed el tiuj la plimulto devas labori kiel vendistoj aŭ aliaj nefakaj laboroj, ĉar ne estas facile trovi fakan laboron. En kelkaj urboj ekster Venezuelo, la venezuelanoj suferas pro ksenofobio kaj kelkaj eĉ estis atakitaj,



malgraŭ tio la kvanto de venezuelanoj kiuj eliras venezuelon kreskiĝas.

Kvankam estas malfacile vivi malproksime de mia lando kaj de miaj familianoj kaj amikoj, estas pli bone povi labori kaj povi helpi ilin ol vivi en Venezuelo kaj ne povi helpi nek min mem.

### **Pri la politika krizo:**

En 2015 la ekonomika krizo jam estis sufiĉe forta, oni jam povis facile rimarki ke preskaŭ ĉiu kiu antaŭe apogis la registaron jam tute ne apogas kaj eĉ malapogas. Sed oni devis atendi la finon de la jaro por la venontaj balotadoj de la Parlamento. En decembro de 2015 estis la balotado, la registaro jam sciis ke ili povis perdi, pro tio la politika kampanjo de la registaro estis tre agresema. Malgraŭ tio la kontraŭstara partio MUD atingis 67% de la Parlamento.

Ekde tiu elekto la registaro faris multajn friponaĵojn por forpreni povon de la Parlamento, inter ili:

- Akuzi pri fraŭdo al 3 elektitaj delegitoj de la Parlamento, por ke la MUD ne havu 2/3 partojn de la parlamento.
- Ŝanĝi la membrojn de la Justica Povo anticipe, ĉar tiuj devis esti elektitaj de la nova parlamento en 2016.

- En 2016 la registaro malpermesis fari referendumon, kiun laŭ la Konstitucio oni povas fari en la duono de la prezidado.

Finfine la 29<sup>an</sup> de Marto 2017, Maduro eksigis la parlamenton kaj la 1<sup>an</sup> de Majo 2017 anoncis la kreadon de nova parlamento. En venezuelo estis ondo da protestoj kiuj estis perforte subpremitaj. Centoj da venezuelanoj mortis kaj miloj estis arestitaj. En tiu momento Luisa Ortega Días, ministro de internaj aferoj, kiu estis elektita de Hugo Chávez, foriris de Venezuelo, kaj eksterlande ŝi denunciis ke Maduro malproksimiĝis de la Konstitucio, kaj ankaŭ denunciis lian perforton de la homaj rajtoj en Venezuelo kaj ankaŭ ŝi denunciis ke kelkaj funkciuloj de la registaro estas estroj de la narkotaĵsakrado de la lando. En Aŭgusto 2018 Maduro kreis sian propran parlamenton.

Dum la jaro 2018 la membroj de la Justica Povo, elektitaj de Maduro, eliris la landon kaj kreis la Justican Povon de Venezuelo



- Je 2014 kaj 2017 ondoj da protestoj estis forte subpremitaj.

en ekzilo, ili ankaŭ denunciis la perforton de homaj rajtoj de la registaro de Maduro. En tiu jaro Maduro faris anticipe balotadon de Prezidanto, ĉar lia periodo finiĝas la 10an de Januaro 2019. En tiu balotado la registaro malpermesis partopreni la partion MUD, tiu kiu havas la plimulton en la Parlamento, ankaŭ malpermesis voĉdoni eksterlande (kion permesas la konstitucio de la lando) kaj ankaŭ malpermesis partopreni al Henrique Capriles kiel kandidato, la ĉefa



La registaro donas armilojn al civiluloj kiuj apogas la registaron kaj ankaŭ subpremas la protestojn.



politikisto kiu povis venki Maduron (alia ebla kandidato Leopoldo López, estis arestita). En tiu balotado Maduro atingis apenaŭ 30% de la voĉdonojn el la registritaj voĉdonantoj.

La 10<sup>an</sup> de Januaro 2019, finiĝis la prezidado de Maduro laŭleĝe, laŭ la Konstitucio la prezidanto de la Parlamento estas la provizora estro de la lando. Nun la plimulto de la landoj rekonas Juan Guaidó kiel prezidanto de Venezuelo.

### **Konkludoj:**

La kaŭzo de la politika kaj ekonomika krizoj en Venezuelo estis la malkorektaj decidoj de la registaro. Usono neniam lasis aĉeti kaj pagi por la venezuela petrolo, fakte Donald Trump helpis plialtigi la kotizon de petrolo (pli ol 60 usonaj dolaroj) pro la malpermeso aĉeti petrolon al Irano.

Ekde 2015 la registaro de Maduro ne estas plimulta en la lando. Fakte oni kalkulas ke apenaŭ 10% de la venezuelanoj ankoraŭ apogas lin.

Ekde 2016 Maduro estas diktatoro, kiu malproksimiĝis de la konstitucio, kaj laŭ ĝi jam ne estas prezidanto ekde la 10an de Januaro 2019.

En Venezuelo mortas miloj da personoj pro: malsato, manko de medikamentoj, reapero de malsanoj kiuj estis malaperigitaj en la pasinteco.

La diktaturo aĉetis kaj ankoraŭ aĉetas armilojn por subpremi la popolon, ni la venezuelanoj bezonas helpon de la aliaj landoj por

forigi la diktaturon. Maduro ne zorgas pri la vivo de la venezuelanoj, li nur volas resti ĉiam kun la povo.

Mi esperas bone klarigi tion, kio suferigas la venezuelanojn.




## Grammata fermis...

Eble al leganto ne estas konata la vorto Grammata, sed iam tiu vorto estis tre fama inter homoj, kiuj interesiĝas pri elektronika legado. Tiutempe oni uzis komputilajn ekranojn legi librojn senpage. Granada kompanio, Grammata, komencis disvendi tre modestan legilon por elektronikaj libroj, kiuj uzis tion, kion ili diskonigis kiel elektronikan inkon. La legilon oni nomis Papyre, honore al antikva subtenilo por skribo antaŭ al apero de papero kaj printarto.

Mi mem aĉetis tiun ilon antaŭ jardeko, ĉar mi trovis, ke la ideo estas bonega, povi legi kontraŭ malmulte da mono, kaj ankaŭ ŝparante arbojn el malapero pro ne plua bezono fari paperon. Bedaŭrinde, aliaj legiloj kun pli da funkcioj aperis, per kiu oni povas aĉeti librojn kontraŭ tre malmulte da mono, kiel Kobo aŭ

Kindle, kaj oni preferis ilin eble ĉar ties librovendejoj elektronikaj funkciis pli bone.

Tamen, honoro kaj memoro al Grammata. Sen ĝi la elektronika legado ne estus same.



## Prometeo kaj la elpis kiel prognozo

de Alberto Buela\*

Prometeo, la ruzulo, estas filo de unu el la unuaj titanoj, Japeto, kiu kune kun Krono batalis kontraŭ Zeŭs' kaj Klimene, tiu kun belaj maleoloj. Li havis tri fratojn: Epimeteo, la turpulo, edzo de Pandora; Atlas', la kuraĝulo, kondamnita subteni la ĉielon sur sia dorso; kaj Menesjo, la sentimulo, kiu estis mortigata de la radio de Zeŭs' kaj sendita en Tartaron. Prometeo kaj Epimeteo luktis favore al Zeŭs kaj Atlas' kaj Menesjo malfavore. De ĉiam Prometeo estis la pli studata pro ties interpretaj riĉaĵoj montrataj de la tekstoj de Hesiodo el Teogonio kaj ankaŭ en Laboroj (=erga, greke εργα).

Oni scias, ke grekoj, male al kristanoj kaj judoj, havis neniam sanktajn librojn, sed tiuj, kiuj plej proksimiĝas al tiuj estas la libroj de Homero, *Iliado* kaj *Odisseo*, krom tiuj de Hesiodo<sup>1</sup>. Grekoj konis ilin kiel *La plej diaj poetoj* (Certamen ab ovo), kaj tiumaniere ili konsideris kaj citis ilin *ad nauseam* (ĝis trosate).

Ambaŭ poetoj vivis samtempe je la lasta kvarono de la jarcento 8<sup>a</sup> a.K., kaj estas neeble kompreni la okcidentan kulturon, kaj grekan kaj latinan, kaj kristanan, sen ili du. Homero pro tio, ke li situigas ĝin rilate al oriento, kaj Hesiodo, ĉar li malfermas la pordon al individua konscienco de antikva homo.

Ili aperas je la momento en kiu grekoj disvolvas el tribo en urbon (polis), momento taŭga por koloniigo kaj komerco maraj kaj por agnosko de juro aprobata de grekaj gedioj.

Indas noti, ke ĉirkaŭ tiu epoko



Prometeo, pentrita de nederlanda Theodor Rombouts je 1620.

efektiviĝas ŝanĝon en la maniero batali, kiu disvolvas el individua al ara da hoplitoj kaj kavaleria, kio igas konscienkon

\* ἀρκυθετα, konstanta lernanto.

<sup>1</sup> La verkoj de Hesiodo, kiuj atingis nin, estas: *Teogonio*, *Laboroj kaj tagoj*, *Fragmentoj*, kaj *Konkurso*.

pri aneco al komunumo aŭ *polis*.

La mito de Prometeo konsistas el du momentoj<sup>2</sup>: la ruzo de Prometeo, kiu trompas Zeŭzon per graso kaj ostoj de taŭro kaj la rabo de la fajro en momento, kiam la dio ne atentis. Tiu punas lin kreante Pandorinon (=tiu, kiu donacas ĉion) kaj katenigante lin al roko.

Prometeo, la antaŭvidulo, estas unu el la sep titanoj gvidataj de Kronos, kiu kontraŭstaris Zeŭzon kaj estis venkataj de li. En tiu batalo li, tamen, flankumis al Zeŭzo, sed la dio ĉiam malkonfidis pri li pro lia ruzemo kaj inteligenteco.

Iam estis diskuto pri tio, kiujn partojn de taŭro oni devas oferti la gediojn, kaj kiujn oni devas doni al homoj, kaj tiam Prometeo senkarnigis taŭron kaj metis la karnon en parton de ledo, kaj la ostojn kaj grason en alian parton ledan, kaj li proponis al Zeŭs', ke li elektu. La dio kompreneble prenis la plej grandan sakon. Sed kiam li komprenis la trompon, li eksklamis: *Ili ja manĝu krudan karnon!* Kaj senhavigis ilin de fajro. De tiam homoj bruligas grason aŭ ĉendas kandelojn honore al gedioj.

Prometeo ekserĉis fajron, ĉar li antaŭsentis, ke ĝi estas en Olimpo kaj ne en la interno de arboj, kiel oni diris tiam, pro tio, ke oni povas produkti ĝin per

frotado de du pecoj de ligno.

Li petis de Atino, ke ŝi eblos lin eniri sekrete la monton Olimpon, kaj tie li forŝtelis la fajron el Zeŭs' per brulanta karbo ene de interno de kano kaj donacis fajron al homoj, kiuj de tiam denove povis manĝi bruligitan karnon.

Zeŭs' ekkoleriĝis kaj ordonis la plej kleran Hefeston miksigi tuj teron kaj akvon, donaci al ĝi voĉon kaj homan vivon por fari belan, ĉarman figuron de knabino... Poste li mendis de Atino, ke ŝi lernigu al ŝi virintaskojn, kiel teksti punktojn delikatajn. La oran Afroditon li mendis provizi ŝian kapon per graco, nerezistebla voluptemo kaj flatoj kap-tantaj; kaj Hermeson li ordonis provizi ŝin per cinika menso kaj nekonstanta karaktero (*Erga* 60-70). Kaj tiel naskigis Pandorino, *el kie venas la fatala raso kaj tribo de virinoj* (*Teogonio*, 591), kiu estis sendata tuj kiel donaco al Epitemeteo, kiu ne atentante la konsilon de sia frato ne akcepti iam donacon el Zeŭs', akceptis ŝin kiel sian edzinon.

Pandorin', havante nesateblan scivolemon, trovis grandan kruĉon kie per granda laboro Prometeo estis fermiginte ĉiun malbonon, kiu povos vundi homon, kaj ŝi forprenis la kruĉkovrilon, lasante tiel eskapi ĉiujn malbonojn, escepte de unu: Elpison (= ελπις), vorto, kiun oni erare

<sup>2</sup> Laŭ fakuloj, la miton venas el tiuj etiologiaj: a) Kial homoj prenas karnon kaj donas al gedioj grason kaj ostojn, b) Kiel ili trovis fajron, kaj c) La origino de virino kiel ruino por viroj. .

tradukis kiel **esperon**. Tamen ne estas sence, ke ĝi estas kune kun la aliaj malbonoj ene de la kruĉo, ĉar espero ne estas malbono. Jen kontraŭdiro, ĉar espero ne estas malbona, sed bona por homo. La plej bona ŝanco por *elpis*, kiun ni havas, estas *esperas*. Tiel faras mitologiistoj nunaj (Verdenius, Pérez Jlménez, etc). Tiel, se *Esperas'* restas ene de la kruĉo, homoj ricevos malbonojn senaverte. Fakuloj venas al tio kaj tie, sed ne daŭrigas la rezoadon aŭ konjekton. Sed *Esperas'* per si mem ne estas malbono. Ĝi simple estas atendi ion, kio povas aŭ ne povas okazi. Malbono estas, tamen, tio, kio okazigas *Esperason*, kiu estas ebleco antaŭkoni aŭ prognozo.

Ene de tiu senco oni devas kompreni la *Elpison* laŭ Hesiodo. Kiel tiun atendon pri io venanta, ĉar malbono por homo estas prognozo aŭ antaŭkono, ĉar kian homaron havos ni, se ni scius kiam ni mortos? Kie kuŝus nia libereco, se ni scius tion, kiam ni mortos? Prognozo, kaj ne espero estas tio, kio restis fermita en tiu kruĉo, kie ĝin enmetis Prometeo, la antaŭvidulo, kaj ne Zeŭs, kiel erare konfuzas kelkaj mitologiistoj.

Jen alrporteto nia al komento pri mito, kiu aĝas 2800 jarojn.

La dua momento pri tiu mito okazas iam Prometeo forrabas, kaŝitan en truo de kaneto, tiun fajron, kiun Zeŭs kaŝis el nomoj. Eksciante la dio pri la rabo, li ordonas, ke nuda Prometeo estu

katenigita al roko en montoj Kaŭkazaj, kie dumtage vulturo manĝos lian hepaton, kiun dumnokte denove kreskos. Vidante lian troan suferon, Heraklo mortigas la vulturon kaj liberigas lin el liaj katenoj, sed Zeŭs pardonis lin, tiel ke li ade ŝajnos prizonulo, li igis lin porti ringon faritan el ĉenero kun kaŭkaza ŝtono tredata al ĝi. De tiam homaro portas ringojn omaĝe al Prometeo, kaj tiumaniere memori, ke homo estas, iusence, prizonigita sur tiu ĉi tero.

Rimarkinda estas la kono pri medicino, kiun jam havis grekoj je la 8<sup>a</sup> jarcento a.K, rilate al tio, ke ili sciis, ke hepato resaniĝas per si mem. Tiu donitaĵo estis konfirmata science komencante la 18<sup>a</sup> jarcento.

Ankaŭ tio, ke estas senlimaj la konkludoj, kiujn oni eltiris el tiu mito: a) oni komparis lin kun Kristo, kiel liberiganto de homaro. b) La sekvoj moralaj de la teorio pri kulpo. c) La gedioj ne estas diaj, sed nur projektoj de homoj. d) Pandorin' estas nova Evo, kaj ties enkonduko de malbono en la mondon, kaj tiel granda plu. Ni lasas malferma la kampon pri multoblaj interpretoj kaj emas al malfermo de individua konscienco de antikva homo.



Muziko

**Antonio Jiménez Manjón\***

Ombrigitaj de famo giganta de gravaj gitaristoj Francisco Tárrega kaj Fernando Sor kaŝas aliaj merito-plenaj muzikistoj, kiel Antonjo Hímenez Manjón', kiu ankaŭ verkis belajn pecojn por gitaro klasika.

Naskiĝis li en Villacarrillo (viĝakariĝo), urbo de la provinco de Hâen', Andaluzio, je 1866, kaj mortis en Bonaero, Argentino, 53 jarojn poste.

Bedaŭrinde li perdis sian vidkapablon pro malsano, kiam li komencis sian duan jaraĝon. Lia patro emis ludi gitaron, kaj por ke la filo kapablos subteni sin kiam la patro ne plu vivos, li instruis la infanon sian konon pri tiu muzikilo. Tamen, poste li sukcesis sendi lin lerni muzikarton en Parizo, kaj poste en Madrido. Tie li koncertumis kaj ankaŭ en diversaj aliaj ĉefurboj eŭropaj, ĝis kiam li translokiĝis en Amerikon, radikiĝante je 1893 en Bonaero, kie li instruis sian arton al multaj gitaramantoj, inter ili Agustín Barrios Mangoré, nun fama paragvaja komponisto por gitaro danke al laboro reserĉa kaj diskoniga de aŭstrala gitaristo John Williams.



D. ANTONIO JIMÉNEZ MANJÓN,  
DISTINGUIDO GUITARRISTA, CIEGO.



Andreo Segovia

zio, Linares.

Antonjo Hímenez Manjón' produktis tre belajn muzikpaĝojn, kiel habanero *Lola*, kies unuajn taktojn oni povas vidi apude, kaj la mondfaman *Andaluzia Kaprico*, opus' 17<sup>a</sup>, kiun oni povas trovi registrita de multaj gitaristoj, kiel Agustín Maruri.

Oni diras, ke ties instruisto, Andrés Segovia, estis antaŭata de Hímenez Manjón' kaj kiel gitarludisto kaj instruisto, kvankam ne estas klare al mi la rilato inter ili du, krom tio, ke Andreo Segovja ankaŭ naskiĝis en la sama provinco, Hâen', de Andalu-

*Lola*  
Habanera

Antonio J. Manjón.  
Op. 6  
poco rit.

Guitar

5 *a tempo*

9 *f* *rit.* *a tempo*

13 *f* *rit.* *a tempo*

\*NOTO.- Oni povas aŭskulti lian muzikon en podkastoj de RNE Clásica je la 3<sup>a</sup> de februaro kaj marto *La guitarra*.

## La peko de l' taliban' **10 La dua edzino**

Nun Abdul' Saleh' estas sepdekjaraĝa. Li perdis sian hararon kaj siajn gepatrojn, kaj eĉ dolĉa Rejn' preterpasis antaŭ kelkaj monatoj. Li vivis kun filoj Asen' kaj Ali', kiuj zorgas pri la vendejo. Ili estas filoj de Benazir', Tiu, kiun oni neniam vidis, iam bofratino lia, pli juna ol sia unua edzino. Benazir' restis sola kiam siaj gepatroj mortis, antaŭ dudek jaroj, ĉar ŝi ne estis edzino. Li parolis al Rejn' pri la afero, kaj anstataŭ akcepti ŝin en sian domon kiel malriĉan familianinon, li deziris fari tion pli bone, kiel edzinon kaj sekve posedantinon de sia domo kune kun sia fratino.

La geedziĝo estis diskreta, kun partopreno nur de familianoj plej proksimaj, kiel estis la kutimo se temas pri dua, tria aŭ kvara edzinoj. Abdul' estis religiema, kaj pro tio li promesis siajn du edzinojn, ke neniu el ili iam havos plendon taŭgan pro la alia edzino. Rejn' estis feliĉa havi sian fratinton hejme ĉe si, same kiel tiam, kiam ili estis infaninoj kaj kunhavis hejmon. Tiam temis pri la hejmo de ilia patro, kaj nun temas pri tiu de ilia edzo, la edzo de ambaŭ ili.

La unuan fojon, kiam li prenis ŝin, tamen, evidentiĝis, ke Benazir' ne estas virga. Abdul' Saleh' ŝajnigis, ke li ne rimarkas, sed li vidis je la vizaĝoj de la fratinoj la frustron, kiu kaŭzas al ili la ebleco, ke li repudias sian duan edzinon. Ĉu ili vere timas, ke li faros tion al la plej juna fratino?

Kiam li jam malŝarĝis ene de la sino de Benazir' kaj ŝi laŭte spiris ĝis kiam ŝi perdis aeron, post longa ripozado, li petis al Rejn', ke ŝi portu La Libron.



Kiam ili kredis, ke li estis malfermonte ĝin je la paĝo kun la formulo rita por repudio, li kantis tiun ĉi fragmanton per elokventa maniero:

Dio estas kompatema, pia, lojala kaj fidela al tiuj, kiuj estas fidelaj kaj malfidelaj, lojalaj kaj mallojalaj, kaj suferas pro la manko de virto de la duaj, kvankam Lia Koro ĝojas pro pento kiu alproksimigas la duajn al la unuaj.

Se via edzino trompas vin, aŭ se ŝi kaŝas ion de vi, aŭskultu ŝin kun zorgo kaj justeco, kaj ne rapide. Vivo de feliĉo valoras multe pli ol momento de dubo. Ĉar Dio estas kompatema kaj vi, filo mia, estas pia.

Ili du rigardadis la viron, unu plena de miro, la alia de pento.

«Edzo», diris Benazir' kun voĉtremo, «mi devas diri ion al vi, ion mi ne diris al vi antaŭe».

«Ni aŭskultas».

«Vi ne estas la unua en mian sinon».

«Rakontu».

«Antaŭ multe da jaroj, mi komencis esti virino, kaj mi konis knabon iomete pli aĝa ol mi, kaj li logis min».

Benazir' refeliĉiĝas. «Kiom da fojoj?»

«Nur unu, edzo. Mi sentis tre malbone pro tio, kaj mi ne vidis lin denove».

«Ĉu pro tio vi rifuzis edziniĝi la tri fojojn, kiam niaj gepatroj volis?»

«Jes, edzo. Mi ne volis esti repudiata kaj sekve altiri malhonoron al mia hejmo. Vi ne edziĝus al mia fratino...»

«Prudenta knabino. Ĉu la gepatroj sciis pri tio?»

«Ne, edzo. Ili nur kredis, ke mi ne ŝatas virojn».

«Ĉu tio estas tiel?»

«Ne! Mi ĝuis multe tiun momenton kun vi, edzo».

«Nu, vere, se mi sciintus, mi ne prenis vin kiel edzinon, Benazir', sed kiel malriĉan familianon de mia edzino, aŭ eble kiel konkubinon. Sed tion neniu scios. Nur Dio kaj ni tri», diris li rigardante Rejnon. «Sed pensu, Benazir', ke pro malpli ol tio mi vidis ŝtonigi aliajn virinojn. Vi komprenas tion, ĉu ne?»

«Jes, edzo», ŝi respondis inter larmoj.

«Sekigu viajn larmojn, kaj venu ĉi tien, Benazir', kaj plezurigu vian edzon denove».

Tiun nokton Abdul' Saleh' ĝuis ambaŭ siajn edzinojn, kaj ili neniam parolis pri tiu temo denove dum siaj tutaj vivoj.

Kaj nun, kiam jam pasis unu monato de kiam jam forpasis lia koramata edzino Rejn', la virino, kiun unue li murdis nome de kruela dio kaj poste savis de la morto kaj amis nome de amanta dio, post amindumi sian duan edzinon, kiu nun estas la unua kaj ununura, li ekdormis inter ŝiaj brakoj.

*Daŭrigota...*



## La Faraono

Ĉapitro 52<sup>a</sup>

La grandega sekvantaro de lia sankteco restis ankoraŭ en la atendejo, sed kvazaŭ fendita du partoj. De unu flanko Herhor, Mefres kaj kelkaj pli maljunaj pastroj, de la alia ĉiuj generaloj, civilaj oficiroj, kaj la plejmulto da junaj pastroj.

La agla okulo de l' faraono tuj rimarkis la dividon de la altranguloj, kaj en la koro de la juna estro ekflamis ĝoja fiero.

"Kaj jen, ne eltirante la glavon, mi akiris venkon!..." —pensis li.

La altranguloj pli kaj pli malkaŝe foriĝis de Herhor kaj Mefres. Neniu dubis, ke ambaŭ ĉefpastroj, ĝis hodiaŭ plej potencaj en la ŝtato, ne posedas la favoron de l' faraono.

Nun la sinjoro transiris en la manĝoĉambron, kie antaŭ ĉio mirigis lin la nombro de la servantaj pastroj kaj de la pladoj.

—Mi devas manĝi ĉion ĉi?  
—demandis li, ne kaŝante sian miron.

La pastro, zorganta pri la kuirejo, klarigis al la faraono, ke la manĝoj, kiujn ne uzos lia sankteco, iros ofere al la dinastio.

Kaj dirante tion, li montris la vicon de statuoj, starantaj apud la muroj.

La sinjoro ekrigardis la statu-

ojn, kiuj havis tian aspekton, kvazaŭ oni nenion donadus al ili, kaj poste la pastrojn, kies vizaĝoj estis freŝaj, kvazaŭ ili manĝus ĉion, kaj li postulis bieron kaj soldatan panon kun ajlo.

La supera pastro ŝtoniĝis de mirego, sed li ripetis la postulon al la malsupera. Ĉi tiu ŝanceliĝis, sed ripetis la postulon al servaj knaboj kaj knabinoj. La knaboj, ŝajnis, ne kredi al la propraj oreloj, sed tuj ili diskuris en la tuta palaco.

Post kvaronhoro ili revenis timigitaj, murmuretante al la pastroj, ke nenie estas soldata pano kaj ajlo.

La faraono ekridetis kaj ordonis, ke de nun neniam manku en la kuirejo simplaj manĝoj. Poste li manĝis kolombon, pecon da fiŝo, tritikan bulkon kaj trinkis iom da vino.

Li konfesis en la animo, ke la manĝo estis preparita bone kaj la vino estis bonega. Sed li ne povis forpeli la penson, ke la kortega kuirejo devas engluti eksterordinarajn sumojn.

Bruliginte incenson por la honoro de la antaŭuloj, la monarĥo iris en la reĝan kabineton, por aŭskulti la raportojn.

Herhor venis la unua. Li sin klinis antaŭ la sinjoro multe pli profunde, ol li faris tion salutante

la monarĥon, kaj kun granda emocio gratulis lin pri la venko super Libianoj.

—Via sankteco —diris li —sin ĵetis sur Libianojn, kiel Tifono sur la mizerajn tendojn de la vagantaj en la dezerto. Vi gajnis grandan batalon kun tre malgrandaj perdoj kaj per unu svingo de via glavo vi finis la militon, kies finon ni, simplaj homoj, ne povis antaŭvidi.

La faraono sentis, ke lia malamikeco al Herhor komencas malfortiĝi.

—Kaj tial —daŭrigis la ĉefpastro —la plej alta kolegio petegas vian sanktecon, ke vi destinu por la bravaj regimentoj dek talentojn da rekompenco... Kaj vi mem, ĉefa militestro, permesu aldoni al via nomo la epiteton: "Venka!..."

Kalkulante je la juneco de l' faraono, Herhor iom troigis la flaton. La sinjoro baldaŭ trankviliĝis kaj subite demandis:

—Kian epiteton vi donus al mi, se mi neniigus la asirian armeon kaj plenigus niajn templojn per la trezoroj de Ninivo kaj Babilono?...

"Li do ĉiam pensas pri tio!..."  
—diris al si la ĉefpastro.

La faraono, kvazaŭ por konfirmi liajn dubojn, ŝanĝis la temon de l' interparolado kaj demandis:

—Kiom da soldatoj ni havas?

—Ĉi tie, apud Memfiso?...

—Ne, en la tuta Egipto.

—Via sankteco havis dek regimentojn... —diris la ĉefpastro. —La respektinda Nitager ĉe la orienta limo havas dek kvin... Dek estas en la sudo, ĉar Nubio komencas boli... Kvin staras garnizone en la tuta lando.

—Kune kvardek —diris la faraono post pripenso.

—Kiom da soldatoj tio estas?

—Ĉirkaŭ sesdek mil...

La sinjoro salte leviĝis de la seĝo.

—Sesdek, anstataŭ cent dudek?... —ekkriis li. —Kion tio signifas?... Kion vi faris kun mia armeo?...

—Ni ne havis sufiĉajn rimedojn por pli granda nombro...

—Ho dioj!... —diris la faraono, kaptante sin je la kapo.  
—Post unu monato atakos nin Asirianoj!... Ni ja estas senarmigitaj...

—Kun Asirio ni havas provizoran traktaton —intermetis Herhor.

—Virino povus tiel respondi, sed ne milita ministro —eksplodis la sinjoro. —Kion valoras traktato, post kiu ne staras armeo?... La duono de la armeo, kiun posedas la reĝo Assar, povus frakasi nin hodiaŭ.

—Volu trankviliĝi, sankta sinjoro. Ĉe la unua sciigo pri

la perfido de Asirianaj, ni havus duonmilionan armeon...

La faraono ridis antaŭ lia nazo.

—Kian?... De kie?... Vi frenezigis, pastro!... Vi fosas en la papirusoj, sed mi sep jarojn servas en la armeo kaj preskaŭ ĉiutage partoprenas en ekzercoj kaj manovroj. Kiamaniere post kelke da monatoj vi havos duonmilionan armeon?...

—Alkuros ĉiuj nobeluloj...

—Mi ne bezonas viajn nobelulojn!... La nobeluloj ne estas soldatoj.

Por duonmiliono armeo oni bezonas almenaŭ cent kvindek regimentojn kaj ni, kiel vi mem diras, posedas nur kvardek... Kie do la homoj, kiuj hodiaŭ paŝtas la brutojn, plugas la teron, knedas potojn aŭ drinkas kaj faras nenion, kie ili lernos la militan metion?... egiptanoj estas mizera materialo por soldatoj; mi scias tion, mi ja vidas ilin ĉiutage... Libiano, greko, ĥeto, ankoraŭ infano, uzas la pafarkon kaj ŝtonĵetilon kaj perfekte svingas la bastonon; post unujara lernado li jam scias bone marŝi. Sed egiptano apenaŭ post trijara laboro komencas marŝi, kiel soldato. Vere estas, ke post du jaroj li jam kutimas al la glavo kaj lanco, sed eĉ kvar jaroj ne sufiĉas al li por traŝi ĵeti sagojn... Do post kelke da monatoj vi povus havi ne armeon, sed du-

onmilionan bandon, kiun tuj ŝakos alia bando, la asiria. Ĉar kvankam la asiriaj regimentoj estas malbone ekzercitaj, sed la asiria soldato scias ĵeti ŝtonojn kaj sagojn, haki kaj piki, kaj antaŭ ĉio li havas la atakemon de sovaĝa besto, kiu tute mankas al la delikata egiptano. Ni rompas la malamikon per tio, ke niaj disciplinitaj kaj ekzercitaj soldatoj estas kiel murrompiloj: oni devas mortigi duonon da soldatoj por detrui la kolonon. Sed sen ekzercita kolono ne ekzistas egipta armeo.

—Saĝan veron diras via sankteco —respondis Harhor al la spireganta faraono. —Nur la dioj tiel konas la aferojn... Mi ankaŭ scias, ke la fortoj de Egipto estas malgrandaj, ke por krei ilin necesaj estas multaj jaroj da laboro... Jen kial mi volas fari traktaton kun Asirio.

—Vi ja jam faris...

—Provizoran. Sargon, vidante la malsanon de via patro, kaj timante vian sanktecon, prokrastis la aferon ĝis via suriro sur la tronon.

La faraonon ree ekregis kolero.

—Kio?... —ekkriis li. —Ili do efektive pensas preni Fenicion?...

Kaj ili supozas, ke mi subskribos la honton de mia regado?... Malbonaj spiritoj

ekregis vin ĉiujn!...

La aŭdienco estis finita. Ĉi tiun fojon Herhor falis sur la vizaĝon, kaj revenante de la sinjoro, meditis en sia animo:

"Lia sankteco aŭskultis la raporton ĝis la fino, li do ne forĵetas miajn servojn... Mi diris al li, ke li devas subskribi la traktaton kun Asirio, la plej malfacila afero do estas finita... Li ŝanĝos sian opinion, antaŭ kiam Sargon venos duan fojon... Sed li estas leono, eĉ ne leono, sed furioza elefanto, ĉi tiu junulo... Tamen li ja nur tial fariĝis faraono, ke li estas nepo de ĉefpastro!... Li ankoraŭ ne komprenis, ke la samaj manoj kiuj levis lin tiel alten..."

En la vestiblo la nobla Herhor haltis, pensis momenton, fine anstataŭ reveni hejmen, iris al la reĝino Nikotris.

En la ĝardeno estis nek virinoj, nek infanoj; el la dissemitaj palacetoj flugis ĝemoj: la virinoj, apartenantaj al la domo de la mortinta faraono, ploris tiun, kiu foriris al la Okcidento.

Ilia ĉagreno, ŝajnas, estis sincera.

Dume en la kabineton de l' sinjoro venis la plej alta juĝisto.

—Kion diros al mi, via ekscelenco? —demandis la sinjoro.

—Antaŭ kelke da tagoj okazis io

eksterordinara en Teboj —respondis la juĝisto. —lu kamparano mortigis la edzinon kaj tri infanojn kaj li mem dronigis sin en sanktan laĝeton.

—Ĉu li estis freneza?

—Ŝajnas, ke li faris tion pro malsato.

La faraono ekmeditis.

—Stranga okazo —diris li —sed mi volus aŭdi ion alian. Kiaj krimoj estas la plej oftaj en la lasta tempo?

La plej alta juĝisto ŝanceliĝis.

—Parolu sentime —diris la sinjoro malpacience —kaj neni-on kaŝu de mi. Mi scias, ke Egipto falis en marĉon, mi volas ĝin eltiri, mi do devas scii ĉion malbonan...

—La plej oftaj... la plej ordinaraj krimoj estas la ribeloj... Sed nur la popolaĉo ribelas... —rapidis aldoni la juĝisto.

—Mi aŭskultas —intermetis la sinjoro.

—En Kosem —daŭrigis la juĝisto —ekribelis regimento de masonistoj kaj ŝtonistoj, al kiuj oni ne donis ĝustatempe la necesajn aferojn.

En Seĥem la kamparanoj mortigis la skribiston, kiu kolektis la impostojn... En Melcatis kaj Pi-hebit kamparanoj detruis la domojn de la feniciaj farmantoj... Apud Kasa ili ne volis rebonigi kanalon, pretendante, ke por ilia laboro devas pagi al ili

la ŝtata trezorejo... Fine, en la porfiraj minejoj la kondamnitaj batis la gardistojn kaj volis forkuri al la maro...

—Ĉi tiuj novaĵoj tute ne surprizas min —respondis la faraono. —Sed kion vi pensas pri ili?

—Antaŭ ĉio oni devas puni la kulpajn...

—Kaj mi pensas, ke antaŭ ĉio oni devas doni al la laboristoj, kion ili rajte postulas —diris la sinjoro. —Malsata bovo kuŝiĝas sur la tero, malsata ĉevalo ŝanceliĝas sur la piedoj kaj ĝemas... Do ĉu oni povas postuli, ke malsata homo laboru kaj ne plendu?

—Via sankteco do... —Pentuer elektos esploran komitaton —interrompis la faraono. —Dume mi ne volas, ke oni punu...

—Sed tiam eksplodos ĝenerala ribelo!... —ekkriis la terurita juĝisto.

La faraono apogis la barbon sur la manoj kaj meditis.

—Bone! —diris li post momento. —La tribunaloj faru sian devon, sed delikate... Pentuer komencu la esploron ankoraŭ hodiaŭ... Vere —aldonis li post momento —pli facile estas decidiĝi en la batalo, ol en la senordo, kiu ekregis Egipton...

Post la foriro de la plej alta juĝisto, la faraono alvokis Tutmozison. Li ordonis al li en

sia nomo saluti la armeon, revenantan de Sodaj Lagoj, kaj disdoni dudek talentojn al la oficiroj kaj soldatoj.

Poste la sinjoro ordonis, ke venu Pentuer, kaj dume akceptis la grandan kasiston.

—Mi volas scii, kia estas la stato de la trezorejo?

—Ni havas —respondis la altrangulo —en la nuna momento la valoron de dudek mil talentoj en la grenejoj, staloj, provizejoj kaj kestoj. Sed la impostoj afluigas ĉiutage.

—Ankaŭ la ribeloj ĉiutage —respondis la faraono. —Kaj kiaj estas entute la enspezoj kaj elspezoj?

—Por la armeo ni elspezas ĉiujare dudek mil talentojn... Por la kortego de via sankteco du ĝis tri mil talentojn ĉiumonate...

—Kaj poste?... Kio ankoraŭ?... Kaj la publikaj laboroj?...

—En la nuna momento ili estas farataj senpage —diris la granda kasisto, mallevente la kapon.

—Kaj la enspezoj?...

—Ni elspezas tiom, kiom ni havas... —murmuretis la kasisto.

—Ni do havas kvardek aŭ kvindek mil talentojn jare —respondis la faraono. —Kie estas la resto?...

—Kiel garantiaĵo ĉe la Fe-

- nicianoj, ĉe bankieroj kaj komercistoj, fine ĉe la sanktaj pastroj...
- Bone —respondis la sinjoro.  
—Sed ekzistas ja la netuŝebla trezorejo de la faraonoj en oro, plateno, arĝento kaj juveloj. Kiom ĝi valoras?...
- Jam antaŭ dek jaroj ĝi estis tuŝita kaj elspezita...
- Kiel?... Por kio?...
- Por la bezonoj de l' kortego —respondis la kasisto —por donacoj al la nomarĥoj kaj temploj...
- La kortego havis enspezojn de la kurantaj impostoj, kaj ĉu la donacoj povis elĉerpi la trezorejon de mia patro?...
- Oziriso-Ramzes, la patro de via sankteco, estis malavara sinjoro kaj faris grandajn donacojn...
- Kiajn?... Kiel grandajn?... Mi volas fine scii tion... —parolis malpacience la faraono.
- Precizaj kalkuloj estas en la arĥivoj, mi memoras nur la ĝeneralajn nombrojn...
- Parolu!...
- Ekzemple al la temploj —respondis la kasisto ŝanceliĝante —Oziriso-Ramzes donis dum sia feliĉa regado ĉirkaŭ cent urbojn, cent dudek ŝipojn, du milionojn da brutoj, du milionojn da sakoj da greno, cent dudek mil ĉevalojn, okdek mil sklavojn, ĉirkaŭ ducent mil barelojn da biero kaj vino, tri milionojn da panoj, tridek mil

vestojn, tricent mil kruĉojn da mielo, oleo kaj incenso... Kaj krom tio mil talentojn da oro, tri mil da arĝento, dek mil da fandita bronzo, ses milionojn da floraj kronoj, mil ducent statuojn de dioj kaj tricent mil juvelojn... Aliajn nombrojn mi ne memoras, sed ĉio estas enskribita... [La donacoj de Ramzes III al la temploj estis multe pli grandaj.]

La faraono kun rido levis la manojn supren kaj post momento li terure ekkoleris kaj batante la tablon per la pugno, ekkriis:

- Plenmano da pastroj uzis tiom da biero, pano, kronoj kaj vestoj, posedante proprajn enspezojn!... Grandegajn enspezojn, kiuj kelkcenton da fojoj superas la bezonojn de ĉi tiuj sanktuloj...
- Via sankteco bonvolis forgesi, ke la pastroj subtenas dekojn da miloj da malriĉuloj, kuracas saman nombron da malsanuloj kaj nutras kaj armas dekelkon da regimentoj per la rimedoj de l' temploj.
- Por kio ili bezonas regimentojn?... La faraonoj ja uzas ilin nur dum la milito. El la malsanuloj ĉiuj preskaŭ pagas por si, aŭ per mano aŭ per laboro. Kaj la malriĉuloj?... Ili ja laboras por la temploj: portas akvon por la dioj, partoprenas en la solenoj kaj, antaŭ ĉio, ludas rolon en la farado de l' mirakloj. Tio estas

ili, kiuj antaŭ la pordoj de l' temploj retrovas la saĝon, vidadon kaj aŭdadon; iliaj vundoj resaniĝas, iliaj piedoj kaj manoj reakiras la kapablon moviĝi, kaj la popolo, vidante tiajn miraklojn, tiom pli fervore preĝas kaj tiom pli malavare oferas al la dioj... La mizeruloj estas kvazaŭ bovinoj kaj ŝafinoj de la temploj ili alportas puran profiton...

—Kaj tial —ekkuraĝis intermeti la kasisto —la pastroj ne elspezas ĉion, sed amasigas kaj pligrandigas sian kapitalon...

—Por kio?

—Por ia subita bezono de l' ŝtato...

—Kiu vidis la kapitalon?

—Mi mem —diris la altrangulo.  
—La trezoroj, kolektitaj en Labirinto, ne malgrandiĝas, sed kreskas de generacio al generacio por ke...

—Por ke —interrompis la faraono —asirianoj havu de kie preni, kiam ili invados Egipton, tiel bone administratan de la pastroj! Mi dankas vin, granda kasisto

—aldonis li. —Mi sciis, ke la financa situacio de Egipto estas

malbona. Sed mi ne supozis, ke la ŝtato estas ruinigita... En la lando ribeloj, ni ne havas armeon, la faraono estas en mizero... Sed la trezorejo de Labirinto pligrandiĝas de generacio al generacio!... Se ĉiu dinastio, nur dinastio, farus tiom da donacaj al la temploj, kiom faris mia patro, Labirinto jam posedus dek naŭ mil talentojn da oro, ĉirkaŭ sesdek mil talentojn da arĝento, kaj kiom da greno, brutoj, tero, sklavoj kaj urboj, kiom da vestoj kaj juveloj, ne povus kalkuli eĉ la plej bona matematikisto!...

La granda kasisto adiaŭis la sinjoron. Sed la faraono ankaŭ ne estis kontenta; ĉar post mallonga konsidero ŝajnis al li, ke li tro malkaŝe parolis kun siaj oficistoj.



*Daŭrigota...*



# *Kajeroj el la Sudo*

*Bulteno de Hispana Asocio  
de Laboristoj Esperantistaj*



---

<http://www.gazetoteko.com/hale/kels103.pdf>

---

ISSN 1886-1997 (Reta versio)

ISSN 1886-1938 (Printita eldono)



ISSN 1886-1938 (printita)  
ISSN 1886-1997  
Depósito legal: Z-2398-88